

Veranstaltungshinweise

Unsere **Esp.-Lernrunden** für: a) Anfänger mit Vorkenntnissen (Stufe A2¹⁾): Do. 18:30-20:00 Uhr, Gemeindehaus der kath. Kirchengemeinde St. Willehad, St.-Willehad-Str. 37, 26954 Nordenham; b) Fortgeschrittene (Stufen B1, B2, C1¹⁾): Do. 19:45-21:15 Uhr, Ev.-luth. Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake. – **Monatliche Vereinstreffen: 19.02.2009**, 20:00 Uhr, **Jahreshauptversammlung**, Gaststätte *Landhaus*, Am Stadion 4, 26919 Brake; **07.03.2009**, 16:00 Uhr, **Besenwerfen**, 19:00 Uhr, **Grünkohlessen**, Gaststätte *Esenshammer Hof*, Alte Heerstr. 11, 26954 Nordenham; **19.03.2009**, 19:30 Uhr, Gaststätte *Friesenheim*, Friesenstr. 15, 26935 Rodenkirchen; **23.04.2009**, 19:30 Uhr, Gaststätte *Müggenkrug*, Elsflether Str. 52, 26125 Oldenburg. Aktuelles und Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

24.02.2009	Freies Forum: Konzept „Herzberg – die Esp.-Stadt“, ICH ²⁾
25.02.2009	Freies Forum: Vorbereitung Dt. & Europ. Esp.-Kongr., ICH ²⁾
13.03.-14.03.2009	Esperanto-Sprachkurse, ICH ²⁾
10.-17.04.2009	25a Printempa Semajno Internacia (PSI), Sankt Andreasberg
20.-24.05.2009	Printempa BARo 2009, Bad Münder
23.-29.05.2009	61a Kongreso de IFEF ³⁾ , Triest, Italien
28.05.-03.06.2009	8a Eŭropa Esperanto-Kongreso zusammen mit dem 86. Deutschen Esperanto-Kongress, Herzberg
07.-12.07.2009	Kultura Esperanto-Festivalo, Helsingør, Dänemark
18.-25.07.2009	65. Jugendweltkongress (IJK), Liberec, Tschechien
25.07.-01.08.2009	94. Esperanto-Weltkongress, Białystok, Polen

¹⁾Erläuterung d. Stufen: http://www.europass.cedefop.europa.eu/img/dynamic/c1349/type.FileContent.file/ELPEexamples_de_DE.pdf, S. 2; auf Esp.: <http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149/#691>

²⁾ICH: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, Tel.: 05521-5983

³⁾IFEF: Internacia Fervojista Esperanto-Federacio; Nachkongress: 30.05.-01.06.2009

Impressum:

Zeitschrift:

Erscheinungsweise:

Herausgeber:

Information und Redaktion:

Bankverbindung

(für Beiträge und Spenden):

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
dreimal jährlich als Druckausgabe und
elektronische Ausgabe, Netzseite:
<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>
Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)
Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,
26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368
Andreas Kück, Tel.: 04702-5044
Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Raiffeisenbank Oldenburg eG
BLZ 28060228
Kontonummer 1200160000
(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

EGU - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 24

ISSN 1861-3330

Feb. – Mai 2009

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Helgoland, 06.12.2008: Mitglieder unseres Vereins verbringen das zweite Adventswochenende auf derjenigen deutschen Nordseeinsel, die am weitesten vom Festland entfernt liegt.

Helgolando, 6-a de Decembro 2008: Membroj de nia klubo pasigas la duan adventsemajnfino en tiu germana Nord-Mara insulo, kiu situas plej malproksime de la ĉeflando.

**EMAS-Kulturtago 2008
(Bremeno, 22-a de Novembro 2008)**

En la junulargastejo en Bremeno preskaŭ 40 esperantistoj el Germanujo, Argentino, Hungarujo, Koreujo kaj Rusujo partoprenis en la Kulturtago de Esperanto-Ligo de Malsupra Saksujo (EMAS). Pro la subita ekvintriĝo kaj per tio ĉi kaŭzitaj trafikproblemoj ne ĉiuj sukcesis alveni akurate. En la unua prelego Franz Kruse informis pri la eŭropa spac-laboratorio Columbus. Al lia laboro apartenas la evoluigo de programaro por Columbus. Ĉi ties fina elkonstruado okazis en Bremeno. En Februaro 2008 li kaj lia edzino ĉeestis en Florido la lanĉon de la spacpramo Space Shuttle. Ĝi transportis Columbus al la Internacia Spac-Stacio (ISS), al kies moduloj Columbus apartenas. Post la EMAS-jarĉefkunveno kaj tagmanĝo



Columbus

Robert Weemeyer, stenografisto en la parlamento de Hanovro, prelegis pri stenografio. Pri la en 2009 en Herzberg, la Esperanto-urbo, samtempe okazantaj Eŭropa Esperanto-Kongreso kaj Germana Esperanto-Kongreso informis Peter Zilvar. Poste li aŭkcivendis Esperanto-librojn. Post la kafopaŭzo Alejandro Cossavella distris la ĉeestantojn per gitaro kaj kantado, rakontis pri sia hejmlando Argentino kaj pri ĝi montris impresajn bildojn. – Andreas

**EMAS-Kulturtago 2008
(Bremen, 22.11.2008)**

In der Jugendherberge in Bremen nahmen fast 40 Esperantisten aus Deutschland, Argentinien, Ungarn, Korea und Russland am Kulturtag des Esperanto-Verbands Niedersachsens (EMAS) teil. Wegen des plötzlichen Wintereinbruchs und dadurch verursachten Verkehrsproblemen schafften es nicht alle, pünktlich anzukommen. Im ersten Vortrag informierte Franz Kruse über das europäische Weltraumlabor Columbus. Zu Franz' Arbeit gehört die Entwicklung von Programmpaketen für Columbus. Dessen Endausbau erfolgte in Bremen. Im Februar 2008 waren Franz und seine Frau in Florida beim Start der Raumfähre Space Shuttle zugegen. Sie transportierte Columbus zur Internationalen Raumstation (ISS), zu deren Modulen Columbus gehört. Nach der EMAS-Jahreshauptversammlung und dem Mittagessen trug Robert Weemeyer, Stenograf im Parlament von Hannover, über Stenografie vor. Über den 2009 in Herzberg, der Esperanto-Stadt, gleichzeitig stattfindenden Europäischen Esperanto-Kongress und Deutschen Esperanto-Kongress informierte Peter Zilvar. Dann versteigerte er Esperanto-Bücher. Nach der Kaffeepause unterhielt Alejandro Cossavella die Anwesenden mit Gitarre und Gesang, erzählte von seiner Heimat Argentinien und zeigte davon beeindruckende Bilder. – Andreas

Enigma

	1	2	3	4	5	6
1						
2					7	
3				8		9
4		10				
5						
6						

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de sud-okcident-Afrika regno.

Horizontale

1: kromnomo de la japana imperiestro; **2:** tertavolo alportita de akvoj; **3:** mamulo kun longaj oreloj; **4:** medio, en kiu difinita tuto de vivestaĵoj vivas [sen finaĵo]; **5:** subite komenci aŭdigi muzikaĵon per muzikilo; **6:** kvina signo de la zodiako [kun finaĵo de akuzativo]

Vertikale

1: aĉa [sen finaĵo]; **2:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [mallongigo]; **3:** duongloba konstruo en formo de renversita kaliko; **4:** patro de la patro; **5:** plej supera k perfekta estaĵo [sen finaĵo]; **6:** libera k malferm-kodita oficprogramaro [mallongigo]; **7:** ekster-havena marparto, kie ŝipoj povas sendanĝere haltadi; **8:** mil kilogramoj [sen finaĵo]; **9:** genro de pinglarboj [sen finaĵo]; **10:** konjunkcio



*Seehund auf
Helgoland / Foko en
Helgoland*

Helgoland

Grön is dat Land,
Rot is de Kant,
Witt is de Sand.
Dat sünd de Farben
Von Helgoland.

Wahlspruch der Helgoländer

Helgoland'

Verdas la land',
Rughas la rand',
Blankas la strand'.
Jen la koloroj
De Helgoland'.

Devizo de la Helgolandanoj
(el la platdiĉa esperantigita de Andreas)

Kiaj vortoj estas en Esperanto laŭ sia statuso? (pli da detaloj: <http://www.ipernity.com/blog/55667/114561>)

- *Akademi-Vortara vorto*: Vorto Fundamenta (ekz. "maro") aŭ oficiala (ekz. "budĝeto"); troviĝas en la Akademio Vortaro (http://www.akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/).
- *Vorto fremda*: Vorto uzebla laŭ Regulo 15 (do Regul-15-vorto; ekz. "agrikulturo"). Laŭ Zamenhof Regul-15-vortoj apartenas al Esperanto "jam de la unua momento de ĝia naskiĝo". Pli pri tio ĉi: <http://www.ipernity.com/blog/55667/106431>.
- *Formo nova*: Tio, pri kio trafas jena teksto de la Antaŭparolo al la Fundamento: "Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas *tro neoportuna*, ĝi ne devos *forigi* aŭ *ŝanĝi* la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon *novan*, kiun ĝi rekomendos uzadi *paralele* kun la formo malnova." La plej multaj formoj novaj tial iĝis Akademi-vortaraj vortoj, ekz. "buĝeto". Ne uzendaj estas tiaj formoj novaj, kiuj ne estas aprobitaj de la Akademio, ekz. "far" (t. e. de kelkaj uzata formo nova al "de", por indiki la aganton ĉe pasivo [vidu Regulon 6], aŭ al "fare de").
- *Nova vorto*: Vorto, pri kiu trafas jena teksto de la Antaŭparolo al la Fundamento: "*Riĉigadi* la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun, per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo ..." Nova vorto estas vorto por tia ideo, por kiu mankas samsignifa simpla Akademi-Vortara vorto kaj kiu ne estas rigardata kiel vorto fremda en la senco de Regulo 15. Ekzemplo: "tajdo" (≈ "alflu-deflu-ciklo"). La diferencigo disde vorto fremda ofte dependas de la maniero interpreti Regulon 15. – Andreas

Was für Wörter gibt es im Esperanto gemäß ihrem Status? (mehr Einzelheiten: <http://www.ipernity.com/blog/55667/114561>)

- *Akademie-Wörterbuch-Wort*: *Fundamento*-Wort (z. B. „maro“) oder offizielles Wort (z. B. „budĝeto“); findet sich im Akademie-Wörterbuch (http://www.akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/).
- *Fremdwort*: Nach Regel 15 verwendbares Wort (also Regel-15-Wort; z. B. „agrikulturo“). Nach Zamenhof gehören Regel-15-Wörter „schon seit dem ersten Augenblick seiner Entstehung“ zu Esperanto. Mehr darüber: <http://www.ipernity.com/blog/55667/106431>.
- *Neue Form*: Das, wofür folgender Text des Vorworts zum *Fundamento* zutrifft: „Wenn irgendeine autorisierte zentrale Institution finden wird, dass das eine oder andere Wort oder die eine oder andere Regel in unserer Sprache zu *unangebracht* ist, wird sie die besagte Form nicht *entfernen* oder *ändern* sollen, sondern sie wird eine *neue* Form vorschlagen können, die zu verwenden *parallel* zur alten Form sie empfehlen wird.“ Die meisten neuen Formen wurden daher Akademie-Wörterbuch-Wörter, z. B. „buĝeto“. Nicht zu verwenden sind solche neuen Formen, die nicht von der Akademie gebilligt wurden, z. B. „far“ (d. i. eine von manchen verwendete neue Form zu „de“, um den Handelnden beim Passiv anzugeben [s. Regel 6], oder zu „fare de“).
- *Neues Wort*: Wort, für das folgender Text des Vorworts zum *Fundamento* zutrifft: „Die Sprache mit neuen Wörtern *bereichern* kann man schon jetzt, durch Beratung mit jenen Personen, die als die maßgebendsten in unserer Sprache angesehen werden, und indem man dafür sorgt, dass alle jene Wörter in derselben Form verwenden...“ Ein neues Wort ist ein Wort für einen solchen Begriff, für den es kein gleichbedeutendes einfaches Akademie-Wörterbuch-Wort gibt und das nicht als Fremdwort im Sinne von Regel 15 angesehen wird. Beispiel: „tajdo“ (≈ „alflu-deflu-ciklo“). Die Unterscheidung vom Fremdwort hängt oft von der Art und Weise ab, Regel 15 auszulegen. – Andreas

La 5-a Rata Rendevuo (Emmerthal, 19-a de Oktobro 2008)

La inviton de Esperanto-Gruppe Hameln sekvis iom pli ol 20 esperantistoj el Germanujo, Hungarujo, Koreujo kaj Rusujo. Unue ili ĝuis en Börry interesan gvidadon tra la tiea muzeo pri agrikultura teĥniko kaj agrikultura laboro. Estis imprese prezentita la transiro de permana al pli kaj pli permaŝina agrikultura laboro. Al la tagmanĝa tablo en Kirchohsen Alke kaj Andreas, peraŭte survoje, estis gviditaj de la navigaciilo ne al ponto ordinara por kruci Vezeron, sed "naĝanta", nome pramo movigata nur de la fluo; la necesa aranĝado oblikva al la fludirekto estas farata per vinĉoj funkciigataj de piloj ŝargataj de fotovoltaika instalaĵo – interesa sperto.



Rapsglanzkäferfangapparat / Kolzbril-skarabkaptaparato

Post la tagmanĝo sekvis vizito de kastelo Hämelschenburg. En la kastela kafejo fine de tiu ĉi denove sukcesa Rata Rendevuo la partoprenantoj raportis pri Esperanto-aranĝoj kaj aliaj eventoj de sia regiono. – Andreas

Das 5. Rata Rendevuo (Emmerthal, 19.10.2008)

Der Einladung der Esperanto-Gruppe Hameln folgten etwas mehr als 20 Esperantisten aus Deutschland, Ungarn, Korea und Russland. Zunächst erfreuten sie sich in Börry an einer interessanten Führung durch das dortige Museum für Landtechnik und Landarbeit. Eindrucksvoll wurde der Übergang von manueller zu immer mehr maschineller Landarbeit dargestellt. Zum Mittagstisch in Kirchohsen wurden Alke und Andreas, mit dem Auto unterwegs, vom Navigationsgerät nicht zu einer normalen Brücke zum Überqueren der Weser geleitet, sondern zu einer „schwimmenden“, nämlich einer Fähre, die nur von der Strömung angetrieben wird; die benötigte Ausrichtung schräg zur Strömungsrichtung erfolgt mit Seilwinden, die mit Batterien betrieben werden, die von einer Photovoltaikanlage geladen werden – eine interessante Erfahrung. Nach dem Mittagessen ging es weiter zu einem Besuch von Schloss Hämelschenburg. Im Schlosscafé berichteten die Teilnehmer am Ende dieses erneut gelungenen Rata Rendevuo von Esperanto-Veranstaltungen und anderen Ereignissen ihrer Region. – Andreas



Schloss Hämelschenburg / Kastelo Hämelschenburg

Helgoland am zweiten Adventswochenende 2008 (05.-07.12.2008)

Letzen Sommer entschlossen sich Mitglieder der Nordenhamer Esperanto-Lerngruppe (NEL), das zweite Adventswochenende auf Helgoland zu verbringen.

Freitag, 5.12.: Wir trafen uns und fuhren mit zwei Autos (wegen des Gepäcks) nach Cuxhaven, wo wir um 9:30 Uhr an der „Alten Liebe“ eintrafen. Die MS Atlantis lag bereit, und einige Mitreisende gingen schon an Bord. Der Bordkran war auch schon in Betrieb. Er lud eine Menge Paletten mit wichtigen Dingen für die Insulaner ins Schiff. Gepäck ausladen, Autos auf den Parkplatz bringen, an Bord gehen, Sitzplatz aussuchen, das waren die nächsten Aktivitäten. Wetter: SW 2, hochnebelartige Bewölkung; *10:30 Uhr:* Leinen los. Wir waren zu fünft und guter Stimmung. Bei glatter See und Überfahrt machten wir mit der Atlantis im Helgoländer Hafen fest. Von Bord gingen ca. 1000 Passagiere. Unsere Rollkoffer klapperten vieltönend die Hafen-Promenade entlang. Mit dem Fahrstuhl fuhren wir zum Oberland und landeten wohlbehalten im Hotel Mocca-Stuben: Zimmer beziehen, Koffer auspacken, Treffen, um gemeinsam die Insel zu erkunden. Oberland und Unterland hatten wir bis zum Abendessen voll im Griff. Es gab viel zu sehen. Fast alle Lokale waren fürs Essen ausgebucht. Dank einer hilfsbereiten Kellnerin und des Telefons blieben wir nicht hungrig. Auch ein gemütlicher Tanzabend war noch möglich.

Samstag, 10:00 Uhr: Bunkerführung: Aus der Insel machte man Anfang des 20. Jahrhunderts einen „Schweizer Käse“. 1945, nach Sprengung der Verteidigungsanlagen mit Kriegshafen, Geschützstellungen, Munition usw., sind dem Oberland 200 bis 300 m Felsen auf der Südseite verloren gegangen. Eingestürzte Gänge wurden noch 1951 zugemauert. Die „Wohnanlagen“ im Bunker für ca. 3500 Inselbewohner (1940) sind noch erhalten und wurden begehbar gemacht. Von 1945 bis 1951 war die Insel Bombenabwurfziel der (britischen) Königlichen Luftwaffe und eine menschenleere Wüste. Nach Rückgabe der Insel 1951 an die Bundesrepublik Deutschland begann der Wiederaufbau. Ein Teil der Altinsulaner kehrte auf ihren „roten Felsen“ zurück.

14:00 Uhr: Überfahrt zur Erkundung der Düne. Sie ist ein von der Insel getrennter „Sandberg“ mit Flugplatz und befestigter Start- und Landebahn für kleine, 2-motorige Propeller-Flugzeuge. Wasser, angeschwemmte Steine, graue Wolken, glitzernde Sonne, Seehunde, teils mit Nachwuchs, über den wir fast stolperten, waren ein faszinierender Anblick.

Sonntag: Nach Frühstück und Kofferpacken machten wir noch einen kleinen Rundgang. Das Oberland ist über den erwähnten Fahrstuhl, eine parallele Treppe mit 184 Stufen, einen sehr steilen Weg und einen Weg mit Treppen erreichbar.

13:30 Uhr: Atlantis sollte ablegen. Schon um 12:45 Uhr war das Schiff fast voll besetzt. Bei spiegelglatter See ging es zurück nach Cuxhaven.

Tja, wir hatten es gut getroffen: freundliche Menschen, gute Gastronomie, eine Menge gesehen und erlebt, wir waren rundherum zufrieden, etwas müde und – wir wurden keine Steuersünder. Helgoland, wir kommen wieder! – Udo-Eugen

Helgolando en la dua adventsemajfino de 2008 (5-a ĝis 7-a de Decembro 2008)

Lastan someron membroj de la Nordenhama Esperanto-Lerngrupo (NEL) decidiĝis pasigi la duan adventsemajfinon en Helgolando.

Vendredo, 5-a de Decembro: Ni renkontiĝis kaj veturis per du aŭtoj (pro la pakaĵo) al Cuxhaven, kie ni alvenis je la 9:30 horo en "Alte Liebe" ("Malnova Amo"). MŜ Atlantis kuŝis preta, kaj kelkaj kunvojaĝantoj jam enŝipiĝis. La ŝipgrupo estis ankaŭ jam funkcia. Ĝi ŝarĝis amason da paledoj kun aferoj gravaj por la insulanoj en la ŝipon. Maŝarĝi pakaĵon, enparklokigi aŭtojn, enŝipiĝi, elekti sidlokon, tio ĉi estis la sekvaj agoj. Vetero: sudokcidenta vento 2, altnebuleca nubaro; *10:30 horo:* malfikso de ŝnuregoj. Ni estis kvinope kaj bonhumore. Ĉe glataj maro kaj transveturo ni firmiĝis per Atlantis en la haveno de Helgolando. Elŝipiĝis ĉ. 1000 pasaĝeroj. Niaj rulvalizoj klakadis multsone laŭlonge de la haven-promenejo. Per lifto ni iris al Oberland ("Supra Lando") kaj bonfarte atingis la hotelon Mocca-Stuben: enĉambriĝi, elpaki la valizojn, renkontiĝi por komune esplori la insulon. Oberland kaj Unterland ("Malsupran Lando") ni estis komplete esplorintaj ĝis la vespermanĝo. Estis multe por vidi. Preskaŭ ĉiuj restoracioj estis rezervitaj por la manĝo. Danke al helppreta kelnerino kaj la telefono ni ne restis malsataj. Ankaŭ agrabra dancvespero estis ankoraŭ ebla.

Sabato, 10:00 horo: Gvidado tra la bunkro: Komence de la 20-a jarcento oni transformis la insulon al "svisa fromaĝo". En 1945, post eksplodigo de la defend-establaĵoj kun milithaveno, kanonejoj, municio ktp., perdiĝis disde Oberland 200 ĝis 300 m da roko en la sudflanko. Disfalintaj irejoj estis fermasonataj ankoraŭ en 1951. La "loĝ-instalaĵoj" en la bunkro por ĉ. 3500 insulanoj (en 1940) estas ankoraŭ konservitaj kaj estis igitaj ireblaj. De 1945 ĝis 1951 la insulo estis bombfaligcelo de la (brita) Reĝa Aerarmeo kaj dezerto malplena je homoj. Post redono de la insulo en 1951 al Federacia Respubliko Germanujo komenciĝis la rekonstruado. Parto de la iamaj insulanoj revenis al sia "ruĝa roko".

14:00 horo: Transveturo por la esplorado de *Düne* ("duno"). Ĝi estas disde la insulo disiĝinta "sablo-monto" kun flug-haveno kaj firmigita start- kaj alteriĝvojo por malgrandaj, 2-motorhavaj helico-aviadiloj. Akvo, de akvo alportitaj ŝtonoj, grizaj nuboj, trembrilanta suno, fokoj, parte kun idaro, super kiu ni preskaŭ faletis, estis fascina vido.

Dimanĉo: Post matenmanĝo kaj pakado de valizoj ni ankoraŭ faris malgrandan rondiron. Oberland estas atingebla per la menciita lifto, paralela ŝtuparo de 184 ŝtupoj, tre kruta vojo kaj vojo kun ŝtuparoj.

13:30 horo: Atlantis estis ekveturonta. Jam je la 12:45 horo la ŝipo estis preskaŭ plenplena. Ĉe spegulglata maro okazis la reveturo al Cuxhaven.

Jes, ni bone trafis tion: afablajn homojn, bonan gastronomion, travivinte kaj vidinte multegon, ni estis plene kontentaj, iom lacaj kaj – ni ne iĝis impostpekintoj. Helgoland', ni revenos! – Esperantigis Andreas